

# SUBTERA SALA MONDO ATENDAS VIN!

**La 42-a Konferenco de ILEI  
en Krakovo (Pollando)  
17-25 julio 2009**

*La pedagogio de Esperanto  
antaŭ la defioj de  
interkultura komunikado*



La dua duontaga ekskurso okazos lunde, la 20an de julio (19 €). Ĝi portos nin al la salminejo Wieliczka, kiu situas proksime al Krakovo, ĝi estas unika loko enskribita en la UNESCO-liston de la Monda Kultura Heredaĵo. Tie troviĝas la plej malnova funkcia salminejo de la mondo, fama pro turismaj allogaĵoj, la unusola kombinaĵo de naturaj tavoloj de salo kun salartaĵoj subtere kreitaj de homoj. La minejo funkcias jam de la mezepokaj tempoj. Laŭ legendo, salon en Wieliczka oni malkovris dank' al Sankta Kinga, antaŭ jarcentoj. Multaj ĉambregoj, subteraj lagoj, preĝejoj, koncertejoj, bankedejoj, vendejoj, manĝejoj, eĉ sanigejo allogas la turistojn de la tuta mondo.

- Valorega monumento de la materia kulturo de la mondo
- Unu el la plej konataj turismaj vidindaĵoj en Pollando
- Ekde 1994 konsiderata kiel Historia Monumento
- Vizitata ĉiujare de pli ol unu miliono da turistoj
- Monde unika mineja konstruaĵo, senĉese malfermata ekde la mezepoko
- En 1978 enskribita al la unua Monda Listo de la Natura kaj Kultura Heredaĵo de UNESCO
- Komplekso konsistanta el pli ol 3 000 subteraj artefaritaj ejoj ligitaj per mingalerioj kies longeco estas preskaŭ 300 kilometroj, lokitaj sur naŭ niveloj de 64 ĝis 327 metroj de profundeco

Turista vojo estas vizitebla fragmento de la salminejo kiu enhavas historie kaj vidinde plej altval-orajn ejojn kiuj troviĝas sur niveloj inter la unua (64 metroj subtere) kaj la tria (135 m de profundeco).

Tie troviĝas

- Unikaj ejoj kun konservitaj spuroj de ekspluatataj laboroj kaj la kolekto de ministaj iloj
- Kapeloj kun neforgeseblaj skulptaĵoj faritaj el salo, inter kiuj la plej bela en la mondo salkapelo de Sankta Kunegunda-Kinga, situanta 101 metrojn subtere
- Sallagoj

Vizitado de subteraĵoj de Wieliczka komenciĝas en la historia Daniłowicz-ŝakto el la 17-a jarcento kaj daŭras preskaŭ 3 horojn.

Post vizito turistoj ripozas en la sana mikroklimato, 125 metroj subtere, en la ejoj kie troviĝas vendejoj kun memoraĵoj, poŝtoficejo, restoracio. Eblas ankaŭ retumi sendrate kaj telefoni per poŝtelefono.

Krom tio, la specifa salmineja mikroklimato estas uzata por kuracado i. a. de la spirsistemo. Sani-gadaj restadoj okazas en la Subtera Terapio Centro situanta 135 metrojn sub la tero.

Post vizito oni tagmanĝas en la restoracio je 125 metroj subtere. Prezo de la ekskurso inkluzivas tagmanĝon.

Kiel kutime, ankaŭ ĉi jare ni petas vin laŭeble subteni ne-pagipovajn kolegojn kaj la agadon de ILEI ĝenerale. Vi povos aldone al via aliĝo donaci al Koleghelpa Fonduso (per kiu ILEI membrigas ne-pagipovajn instruistojn), al Fonduso Dazzini (subteno al ne-pagipovaj partoprenantoj de konferenco), al konferenca kaso, ktp. Ankaŭ indas subteni la organizadon de nova seminario en Afriko, planata por julio 2009 en Kinŝaso.

Informoj pri la konferenco, ĝia programo, urbo, partoprenkondiĉoj en [http://ilei.info/konferenco/2009/konferenco\\_2009.php](http://ilei.info/konferenco/2009/konferenco_2009.php)  
Reta aliĝilo en <http://ilei.info/konferenco/alighilo2009.php>

Vi ĉiam estas bonvena skribi al:

Malgosia J. Kornamicka margareta.ilei.pollando@gmail.com — ĉefa loka organizanto,

Radojica Petrović rade@ikso.net — prezidanto de ILEI,

Sjoerd Bosga sjoerd@esperanto.se — kasisto de ILEI.

*BONVENON!*